# ATEISMO

REVUO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO




**Novembro 2024**

N-ro 39 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

Antaŭ ok jaroj, mi skribis la jenajn vortojn en tiu ĉi sama rubriko: “Malfacilas eviti mencii la ŝokan eventon, kiu okazis nur unu semajnon antaŭ ol mi komencis verki tiun ĉi redaktoran Vorton: la elektiĝon de Donald Trump”. Kaj jen, nekredeble, Trump revenas al la Blanka Domo! Inter aliaj probablaj postsekvoj negativaj estos la plifortiĝo de kristannaciismo kaj malplifortiĝo de la apartigo de ŝtato kaj religio. Kiel en 2016, Trump, kiu mem ne estas religiema, uzis religion por gajni subtenon en la elektokampanjo. Li dankis Dion por sia postvivado de atenco kaj deklaris, ke Dio savis lin por ke li povu savi Usonon. (Ĉi-numere legeblas pli multe pri tio.) Ni vidu kiel evoluos la situacio en Usono.

Nun mi saltu trans oceanon al Afriko. Tiu ĉi numero raportas pri la ĉeesto de ATEO en la Aruŝa UK kaj pri afrikaj esperantistoj, kiuj venis al ni dum la Movada Foiro kaj al nia kunveno. Sed ankaŭ menciindas, ke kiam mi estis en Tanzanio, mi havis klaran senton de bonaj rilatoj inter kristanoj kaj islamanoj, la du plej grandaj religiaj grupoj en tiu lando. Fakte, esploroj indikas altan nivelon de religia toleremo en Afriko. Laŭ Afrobarometer 2020, 95% da afrikanoj asocias sin kun religio, sed samtempe 87% da ili ŝatus, aŭ almenaŭ ne estus ĝenataj, vivi apud alireligianoj. Krome, ne estas malofta afero en Afriko, ke homoj de malsamaj religioj geedziĝas sen forlasi siajn proprajn kredojn.

Ŝajnas ke Afrobarometer ne demandis pri senreligiuloj aŭ ateistoj. Tamen laŭ orientafrikaj partoprenantoj en la ATEO-kunveno, ordinaraj nekredantoj ne frontas seriozajn problemojn en la ĉiutaga vivo en siaj landoj – aliflanke, en antaŭaj numeroj de nia revuo aperis artikoloj pri la izolado kaj persekutado de ateistoj en okcidenta Afriko.

Tio kondukas al la ĉefa temo de tiu ĉi numero: malfido kaj malestimo al ateistoj. La redakcio prezentis la jenajn demandojn: Ĉu malfido kaj malestimo al ateistoj estas problemo en la ĉiutaga aŭ politika vivo? Ĉu eventuala malfido aŭ malestimo kontraŭ ateistoj estas simila al tiu, kiu regas ankaŭ inter anoj de malsamaj religioj? Ni ricevis nur tri kontribuojn tiutemajn, sed ili ĉiuj estas interesaj. Plua artikolo, pri “teistnormeco”, ankaŭ helpas klarigi la malfidon al ateistoj. Ateistaj voĉoj multe malpli aŭdiĝas, do stereotipoj kaj antaŭjuĝoj restas fortaj.

Rilate al la ĉeftemo, mi ŝatus demandi: Ĉu oni povas fidi homojn, kies moralo venas de nepruvita ekstera forto, kaj ofte de timo je tiu forto, kaj ne de interna konvinkiĝo? Ĉu oni povas fidi homojn, kiuj akceptas kiel sanktaj la strangaĵojn, fabelaĵojn, kruelaĵojn kaj malmodernaĵojn en antikvaj skribaĵoj? Ĉu oni povas fidi homojn, kiuj blinde apartenas al religio nur ĉar aliaj ĉirkaŭ ili apartenas al ĝi? Kio pli gravas: kredo je dio kaj aparteno al religio – aŭ homa racio kaj empatio, kaj senpartia interhoma dialogo?

# La morala ĝangalo kaj la malfido kontraŭ ateistoj

*John Greenwood (Britio)*

*Imagu: vi perdiĝas en pluvarbaro. Vi renkontas du homojn, kiuj pretas helpi vin per siaj mapoj. La unua homo konfesas, ke lia mapo estas verŝajne ne tute ĝusta. Lia praavo ekverkis ĝin, sed multaj de la vojoj tiam desegnitaj estas eraraj. La mapo ŝajnas malorda palimpsesto de necertaj linioj kaj notoj. Aliflanke, la mapo de la dua helpanto estas perfekte preciza, kaj laŭ la homo mem, ne eblas plibonigi ĝin. Sed legi tiun mapon estas tiklega tasko, kaj vi fidu neniun alian ol li mem por intepreti ĝin prave. Al kiu vi fidas?*

En 2009, enketo farita de la Fondaĵo Perseu Abramo trovis ke 17% de brazilanoj sentis abomenon kontraŭ ateistoj. La sola alia socia grupo kiu stimulis tiom da naŭzo al la respondintoj estis narkomaniuloj, kaj nur 10% el ili esprimis similan forpuŝon kontraŭ viraj prostituitoj[1]. La enketo ne esploris la kaŭzojn de tiu malamo kontraŭ nereligiuloj. Aliflanke, nur 5% esprimis abomenon kontraŭ treege religiemaj homoj.

Eble ni ne devus esti surprizataj pri tiuj datumoj de la lando kun la plej granda romkatolika loĝantaro en la mondo. Sed alia esploro, farita de psikologoj de la universatatoj de Brita Kolumbio (Kanado) kaj Oregono (Usono) en 2011 konfirmis la konkludon, ke ateistoj estas vaste malfidataj[2]. La esploristoj demandis al preskaŭ 800 studentoj pri fikcia situacio. Imagu se veturanto difektus parkumitan aŭton, kaj forveturus sen forlasi kontakt-informojn, kaj poste trovus monujon kaj ŝtelus el ĝi la monbiletojn. Ĉu tia homo pli verŝajne estus instruisto, ateista instruisto, aŭ seksatencema instruisto? La partoprenintoj, kiu inkluzivis kaj religiulojn kaj ateistojn, plej ofte elektis la ateistan instruiston kiel kulpanto.

Dmitris Xygalatas kondukis similan psikologian eksperimenton ĉe la Universitato de Konektikuto[3]. En intervjuo li diris ke, “Multaj homoj, kiuj ne estas religiaj, kredas, ke religieco havas pozitivajn avantaĝojn, kaj oni devus nutri ĝin eĉ se ĝi estas erara.”


Psikologoj de la Universitato de Nottingham Trent trovis same[4]. Eĉ ateistaj partoprenintoj malestimis la moralan sintenon de fikcia ateista instruisto pli ol tiun de seksperfortinto. Kaj multaj el ili kulpis pri logika eraro, kiun ni povus nomi “kunliga misrezonado” (angle: “conjunction fallacy”). Logike la ĝusta respondo estas ĉiam “instruisto”, ĉar la aliaj du kategorioj estas subgrupoj de tiu plej granda grupo. Estas bone konata ke multaj homoj ofte ne

1 www.paulopes.com.br/2009/05/ateus-e-usuarios-de-drogas-sao-os-mais.html

2 web.archive.org/web/20191219000400/http://usatoday30.usatoday.com/news/religion/story/2011-12-10/religion-atheism/51777612/1

3 today.uconn.edu/2017/08/think-atheists-likely-serial-killers/#

4 www.bps.org.uk/research-digest/distrust-atheists-deeply-and-culturally-ingrained-even-among-atheists




*Bona ekzemplo de malfido al ateistoj - esprimita de la "patro de moderna liberalismo" kaj subtenanto de religia tolerado!*

sukcesas respondi al tiaj demandoj logike, ĉar ilin influas la dua, akcesora kategorio. Laŭ la verkintoj de la esploro, la rezultoj sugestas ke, almenaŭ supraĵe, la imaga rakonto de la malmorala homo pensigis la partoprenintojn (eĉ tiuj kiuj ne kredas je Dio) pri tipa ateista konduto.

Sed ĉu tiu konkludo estas tiel solida kiel oni unue supozus? Eble la studentoj kiuj partoprenis la esploron pli facile imagis “ateistan instruiston” ol “seksatenceman instruiston”. Eble la maldekstrema, legema licenciulo kaj liberpensulo estas fiksita stereotipo en la brita socio. Kvankam ĉiuj aŭdis pri instruistoj kiuj seksperfortadas studentojn, la socia stereotipo de seksatencemulo povas esti bildo de pli agresema, ege vireca kanajlo, ol milda barbulo kiu edukas niajn infanojn.

En Britio, nereligiuloj konsistigis 37% de la loĝantaro en la registara popolnombrado de 2021. Tiu nombro akre altiĝis dum la lastaj kelkaj jardekoj, kaj ni nun estas neignorebla minoritato. Tial, oni ne supozas, ke ateistoj suferas pro negativaj antaŭjuĝoj kaj diskriminacio tiom, kiom iliaj samideanoj en aliaj pli religiemaj aŭ sekularaj ŝtatoj. Diskriminacio kontraŭ ateistoj estas kontraŭleĝa, same kiel kontraŭ kredantoj de religioj. Dunganto kiu

rifuzus dungi aŭ promocii kandidaton nur pro manko de religio riskus, teorie, proceson. Tiusence, britaj ateistoj estas protektitaj kontraŭ misuzado.

Sed la universitata esploro jam menciita sugestas ke ja estas profunda malfido, enradikigita en la socia konscio, kontraŭ ateistoj. Ne malmultaj ankoraŭ konfuzas ateismon kun nihilismo. Se homoj ne ricevas siajn moralajn regulojn de Dio, ĉu ili efektive havas neniun moralan sencon?

Oni povas atentigi pri la ĝenerale bona konduto de tiuj milionoj da ateistoj kiuj prizorgadas siajn gefamilianojn, kiuj volontuladas por bonfaremaj asociaj, kaj kiuj ne ĵetadas la rubaĵon surstraten.

Dmitris Xygalatas diris, "ateistoj multe malpli ofte faras krimojn ol religiuloj, kaj tutmonde la malplej religiemaj landoj havas la plej malaltajn krimoftecojn. Tio kompreneble estas korelacia indico: ĝi ne signifas, ke esti ateisto rezultigas malpli da krimoj. Sed la intuicio, kiun nia esploro malkaŝas, t.e. ke ateistoj estas malmoralaj, certe ne estas subtenata de la realo."

Unu el la ĉefaj obstakloj al realeca takso de ateistoj estas la alloga simpleco de religiaj moralaj kadroj. Kial oni ne ŝtelu? Tutsimple, pro tio ke Dio malpermesas ĝin, laŭ la religia vidpunkto.

Sed la ateista respondo al la sama demando estas ĉiam multe pli komplika. Kial oni ne ŝtelu? Laŭ iuj filozofoj, konduti tiel damaĝas la tutan socion, kaj oni devus agi tiel, kiel oni volus mem esti traktata de aliuloj. Oni povas citi la "kategorian imperativon" de Kant. Sed laŭ kelkaj, ekzistas esceptoj: ne havante iun ajn alian rimedon, se oni ŝtelus manĝaĵon de supervendejo por manĝigi la gefilojn, ĉu tio estus tiel serioza krimo kiel la ŝtelado fare de bankrabisto aŭ de fraŭdisto? Ĉu la valoro de la ŝtelitaj varoj gravas? Ne certas, dependas. Entute, tiaj kazoj ĉiam bezonas pli profundan esploron kaj pridiskuton. Tamen por la religiema menso tia kontingenca situacio kondukas rekte al neeltenebla kaoso.

Tiajn komplikaĵojn religiaj kredoj evitadas, kaj ju pli fundamentista estas la sekto, des pli kontentige simplaj estas la solvoj al moralaj problemoj. La Biblio aŭ la Korano solvas ĉiun necertaĵon. Por religiuloj, neniu morala diskuto, kiel ajn klera, povas superi leĝojn ĉizitajn sur ŝtontabuloj. La aŭstralia komikisto Tim Minchin skribis ke, "se vi nur fermas la okulojn kaj ŝtopas la orelojn kontraŭ la akumulita scio de la pasintaj du mil jaroj, nu, morale vi elturniĝas, kaj danke al Kristo, vi devas legi ununuran libron!"

Sed ĉu religiaj moralaj kadroj estas tiel fiksitaj kaj certaj kiel iliaj adeptoj imagas? Antaŭ nur jardekoj la plimulto de kristanoj en Britio kredis ke oni manfrapu infanojn kiel morala devo. Nuntempe, preskaŭ neniu kredas tion, eĉ se oni povas pravigi la agon laŭ Biblia verso. Religiuloj, kiel ni ĉiuj, ŝanĝadas siajn sintenojn pri multaj aliaj moralaj demandoj. Neniuj krom fundamentistoj havas vere fiksitan moralan sistemon, kaj malmultaj el ni volus imiti ilin.

Se kaj ateistoj kaj religiuloj vivas laŭ fleksеblaj etikaj kadroj, kial do ni ateistoj estas pli malfidataj, eĉ de aliaj ateistoj? Jen ebla klarigo: ni ĉiuj vagas tra la morala ĝangalo de niaj vivoj, kaj dume verkas kaj reverkas mapojn hereditajn de niaj praulој. Nur ni ateistoj ne ŝajnigas ke ni jam ricevis la perfektan mapon desupre, kaj tiu konfeso konstatigas nin kiom malmulte ni efektive komprenas. Ĝi estas humiliga konstato por la homa egoo, sed per ĝi naskiĝas la scienca metodo.

# Kiel malfidigaj stereotipoj pri ateistoj efikas sur la usonan socion

*Bill Maxey (Usono)*

El mia usona vidpunkto, malfido kaj malestimo al ateistoj certe estas problemo – kaj en la ĉiutaga kaj en la politika vivo. Tiuj sintenoj radikas en tio ke la hegemonia religia elito antaŭ jarcentoj aldonis al la simpla difino de la vorto ateisto kelkajn kromnociojn, negativajn kaj malverajn, kiuj kreis stereotipon kiu restas senmorta en la mensoj de teistoj.

Multaj usonanoj kredas ke "aŭtenta" usonano ne povas esti ateisto. Oni dubas pri ties patriotismo, sindevigo al la demokrata sistemo kaj akcepto de la tradiciaj moralaj valoroj de la socio. Pro tio ili preferas eviti kiel eble plej interagojn kun sendiuloj, sed kiam tio ne eblas, ili ne kapablas plene fidi ilin. Ateistoj suferas pro tio.

Eĉ se ateistoj mem ne nomas tiujn sintenojn diskriminacio aŭ ne sentas sin persekutataj, tiaj majoritataj supozoj efikas tiel forte ke ateistoj hezitas konfesi sian nekredemon al familianoj, geamikoj kaj kolegoj. Ili timas ke tia konfeso provokos apartigon disde karaj homoj, malhelpos sukceson en la laborejo aŭ profesio, aŭ embarasos ilin en gravaj situacioj.

Se familio montriĝas ateista, ties infanoj nemalofte suferas diskriminacion en la lernejo kaj (ekzemple) ne rajtas aliĝi al skoltaj organizaĵoj kiuj ankoraŭ postulas kredon je (ajna) dio. La familio fariĝas objekto de ĝenerala suspektemo, kaj al multaj religiuloj ne plaĉas kunlabori kun ili eĉ pri bonfaraj projektoj. Frostiĝas alie varmaj interrilatoj kun diversaj homoj.

Pli vaste, tiuj venenaj sintenoj malhelpas ke la voĉoj de ateistoj aŭdiĝu en la publika sfero. Pro tio, multaj raciaj pensoj kaj ideoj eĉ ne povas eniri la debaton pri gravaj problemoj en la komunumo. Voĉoj kiuj povus gvidi la diskutadon al pli justaj solvoj, rekonantaj ĉies vidpunktojn, restas silent(igit)aj.

Tiuj suspektemo kaj subpremado de ateistaj voĉoj fariĝas eĉ pli gravaj en la politika vivo, kie ili obstaklas eniron en la publikan spacon.

Multaj opinias ke homo, kiu ne konfesas la majoritatan religion, ne estas plenrajta civitano kaj do nek kapablas nek rajtas reprezenti ilin. Tial, ne troviĝas en la pli altaj kaj gravaj politikaj debatoj la ideoj kaj argumentoj de tute kapablaj, raciaj kaj diversspertaj sekularistoj ĉar ili – kiel kandidatoj – ne sukcesas en la voĉdonado pro la fatalaj malestimo kaj malfido. Multloke la daŭra manko de voĉdona sukceso malkuraĝigas ateistajn aspirantojn eĉ kandidatiĝi.

Pro tiu historia malsukceso, tiuj kiuj pretas konscience batali por la apartigo de eklezio disde ŝtato ne povas gajni la potencon tion fari. Sendiuloj estas la plej spertaj kaj kompetentaj homoj por prezenti ideojn el nereligia vidpunkto dum la diskutoj pri leĝ- aŭ regul-proponoj. Tamen, pro la ĉiea nemeritita malestimo kontraŭ ili, ateistoj devas daŭre agadi nur per eksteraj kampanjoj por influi leĝdonantojn, preskaŭ ĉiuj el kiuj – eĉ se iuspecaj kaŝitaj liberpensuloj – almenaŭ ŝajnigas kredon je diaĵoj. Eĉ en la 21a jarcento, ateistoj ankoraŭ ne havas sidlokojn ĉe la diversnivelaj politikaj tabloj.

Efektive la diskriminacio kontraŭ ateistoj en ambaŭ kampoj estas problemo ne nur por sendiuloj sed ankaŭ por la tuta socio. Tute raciaj argumentoj, kaj eventuale nova strukturo por pritaksi proponojn, mankas al

la diskutoj kaj decidoj rilate la bonfarton de ĉiuj civitanoj, kune kun la povo forigi la tro ofte neefikajn “solvojn” de la pasinteco.

La dua demando – nome, ĉu eventuala malfido aŭ malestimo kontraŭ ateistoj estas simila al tiu, kiu regas ankaŭ inter anoj de malsamaj religioj – certe estas pensiga kaj esplorinda. Tamen mi hezitas respondi ĉar multaj faktoroj interplektiĝas en la afero. Inter ili, sendube la religio de la kredanto kaj tiu de la “malestimato”, la fervoro de la kredoj kaj religia engaĝiĝo, stereotipaj bildoj, personaj spertoj kun alireligiuloj kaj ateistoj, kaj (mal)liberaleco de valoroj grave rolas en la formiĝo de la sintenoj. Alidimensie, ekzistas malsamaj gradoj de malestimo kaj malfido – ĉu unu-ĉu du-specaj – aplikeblaj kiel konvenas al la kazo. La eventualaj kombinoj ŝajnas sennombraj. Sociologia esplorado verŝajne povus trovi almenaŭ provizorajn respondojn al la demando, kiuj poste kondukus al pli preciza studado kaj pli bona kompreno de la fenomeno.

Mi emas pensi, tamen, ke plej ofte ja ekzistas diferenco inter la sintenoj al alireligiuloj kaj al ateistoj. Iuj religiuloj ja kritikas praktikantojn de aliaj religioj ĉar ĉi tiuj adoras falsajn diojn aŭ akceptas malĝustajn dogmojn aŭ diservas laŭ strangaj kutimoj. Sed samtempe ili sentas, eĉ se senkonscie, komunan agnoskon de la ekzisto de kreinto kaj de la efikeco de supernatura potenco. Supozindas ke ankaŭ tiuj havas moralan kompason por gvidi siajn vivojn, kaj tiu ligo mildigas eventualan malŝaton kaj efikas iom komfortige.

Aliflanke, multaj kredantoj daŭre rigardas ateistojn tra la lenso de stereotipoj – kie ili aspektas suspektindaj. Ili “certe” ne posedas funkciantan vivgvidan moraligilon kaj volas ruinige sekularigi la socion, ĉar ili definitive rifuzas rekoni supernaturaĵojn kaj malakceptas religiajn dogmojn. Foje kredantoj suferas ŝokon konstatante ke ŝajne “bonaj homoj” estas sendiuloj, kaj tio efikas maltrankvilige, eĉ minace. La fakto reliefigas al la kredantoj la ideon ke ili mem ne pensas tute racie kaj eventuale eraras rilate akcepton de religiaj ideoj.

Sed finfine ateistoj agnoskas nenian dion, kaj tio por la adorantoj metas raciulojn en unikan kategorion, kies kriterioj ili verŝajne ne tute komprenas – kaj plej ofte eĉ ne volas esplori.




*Sendependa kristana pastro en Usono aldonis al kristnaska ekspozicio ateiston reprezentatan de Reĝo Herodo! (Fonto: Iowa's News Now)*

# Malfido kaj malestimo al ateistoj kaj alireligiuloj: kiam emocio pli fortas ol racio

*Ermito (Suda Koreio)*

Ĉu malfido kaj malestimo al ateistoj estas problemo en la ĉiutaga aŭ politika vivo? Jes ja, ili estas problemoj eĉ gravegaj ne nur en la politika sed eĉ pli en la ĉiutaga vivo, ĉar en la ordinara vivo oni nenion povas atingi per malfido kaj malestimo.

Se ekzistas malfido, tiam oni nur bezonas rezoni pri la kaŭzo de tiu malfido kaj surbaze de tiu ekzamenado solvi la problemon. Tiel komplete malaperos tiu malfido. Eble kiel sekvo povus eĉ okazi, ke la rilato ŝarĝita de tiu malfido resaniĝos. Malestimi oni ja povas, kvankam esence ĝi tute ne estas laŭdinda sinteno. Se kompatindulo saturita de malestimemo sincere klopodus klarigi la kialon de tiu malestimo, li eble povus forigi ĝin. Do ankaŭ same kiel pri tiu malfidemulo, oni ja povas sobre mediti kaj fine trovi la radikon de malestimo. Malestimo estas severe ŝarĝita de vere venena emocio kaj ĝi povas eĉ ronĝi la animon de tiu, kiu malestimas. Sekve ĝi estas nepre forigenda.

Malfido kaj malestimo estas apenaŭ disigeble ligitaj kun emocioj, kiuj serioze lamigas, eĉ paralizas racian rezonadon. Kie multas kompatinduloj kun malvolo pri racia pensado, tie la ĉiutaga kaj politika vivo estos vere infera, ĉar neniam elĉerpiĝos pafaĵoj de malpaco inter anoj de tiu socio.

Fakte malfido kaj malestimo pro malsameco de religioj estas imbecilaĵo, kiu eĉ ne meritas nomiĝi kiel farso. Kvankam sufiĉe multas mirakloj, rakontoj, doktrinoj en la ‘sanktaj libroj’, tamen la kerna instruo de multaj religioj estas simple ami aliajn, senkondiĉe, do eĉ ami siajn malamikojn. Ĉu aliuloj kun aliaj religioj estas eĉ pli abomenindaj ol malamikoj kaj meritas nur la morton? Jen vere mizera farso, kiun eĉ tri-jaruloj devus moki.

Sed kial oni tiom facile sintenas absurde, se temas pri malsameco de religio? La distingo inter ortodoksa kaj hereza vere pridubindas. La prefikso “orto” (prava) tute klare montras kio pravas, kio ne. Tiu blinda fido pri sia praveco aŭ justeco donas al tiuj kredantoj kun ‘ortodoksa religio’ impulson apenaŭ elĉerpeblan, kaj blinda kredo havas senliman potencialon krei katastrofojn en la nomo de ‘sanktaj religioj’. Oni tute ne bezonas penegi eltrovi ekzemplojn historiajn, kaj plie sufiĉe multaj tiaj mizeroj kaj tiuj simptomoj ankoraŭ daŭras ie en la mondo. Ĉu nia mondo estas turmentoplena? Povas esti tiel, sed oni ne forgesu ke la plejparto de tiuj mizeroj estas generitaj de homa malsaĝeco.

Ankaŭ ateismo estas io simila al religio laŭ la vidpunkto de la kredantoj de ortodoksaj religioj, kaj sekve por ili ateistoj estas kompatindaj kaj meritaj je malfido kaj sekve malestimo.

Malfido kaj malestimo estas negativaj emociaj aferoj kaj sekve nepre forigendas, se oni deziras havi pli bonan vivon jam en tiu ĉi mondo, ne poste, postmorte. Kompreneble ekzistas multaj rakontoj, asertoj ktp pri postmorta vivo, sed ili tute ne interesas min, ĉar preskaŭ neniu certas pri tiu postmorta mondo. Estas nur ‘onidiroj’ – ĉu kredi aŭ ne estas pure persona decido, do tute ne interveninda afero.

Ajna religia kredo estas io vere firme ligita ne nur kun racio sed ankaŭ kun emocio, kaj tial apenaŭ eblas diskuti pri kredo racie laŭ strikta logiko. Racion oni povus modifi, kvankam tio ne estas facile, sed ĉu eblas modifi emocion? Apenaŭ aŭ neniam, ĉar en la sfero de emocio troviĝas nur jes aŭ ne laŭ sento – kaj sento tute ne toleras logikon. Io povas esti prava logike eĉ strikte, sed tamen oni apenaŭ volas akcepti aŭ agnoski ĝin, kiam oniaj sentoj estas vunditaj. Kiam oni estas ofendita, tiam racia rezonemo malfortiĝas kaj sekve logika diskuto estas simple kimero nur prirevebla.

# La vojo al apostatiĝo: la Katolika Eklezio nek demokratas nek demokratiĝos

*Luiz Ladeira (Portugalio)*

## Dokumentoj por atingi la celon

Oficiale mi forlasis la Katolikan Eklezion la 19-an de aprilo 2024, 73-jaraĝa, sed fakte tion mi jam estis farinta psike kiam mi estis 19-jaraĝa. Estas pluraj kialoj por tiu malfruo, sed unu el ili koncernis nescion pri mia baptodato. Nur post kiam mi sukcesis trovi ĝin (feliĉe mia patrino manuskripte registris tion sur mia unua oficiala identec-dokumento – naskiĝ-atestilo), mi sukcesis antaŭenigi mian kelkjaran intencon apostatiĝi. Por tio mi sendis oficialan dokumenton (notarie subskribitan), kune kun porresponda poŝtmarkita koverto, al la episkopejo kiu respondecas pri mia bapta paroĥo. En ĝi mi postulis nuligon de la registrita bapto-enskribaĵo farita meze de decembro de la 1950-a jaro. La petita pravigo estis ke mia nuna filozofia vidpunkto pri la signifo de la homa vivo ne akordiĝas kun iu ajn religia opcio. Tial mi petis malregistriĝon. Jen Esperanta traduko de ĝi:

### Formala disiĝo de la Katolika Eklezio

LUIZ FILIPE PAULO E LADEIRA, per letero komunikis eksteran agon el interna volo, netrudita, forlasi la Katolikan Eklezion. Tian volon la kompetenta Eklezia instanco agnoskas kaj tial ĝi estos enskribita en la libro de baptoj. Li restu konscia pri ĉiuj postsekvoj de sia ago:

1. La Bapto jam realigita neforviŝeblas … pro tio ke la signo de la ricevita graco neniam forviŝiĝas. Iam katolika, ĉiam katolika.

2. Laŭ k. 11 de la Kanona Jura Regularo tiu, kiu formale forlasis la Katolikan Eklezion restas submetita al ĉiuj ekleziaj leĝoj.

3. Li, per ĉi formala disiĝ-ago, tuj ricevas la kuracan punon de *Ekskomuniko latae sententiae* (k. 1364§1), kiu havas la sekvojn menciitajn je k. 1331. La ricevita puno estas kuraca en la senco ke ĝi videbligas la gravecon de la ago kaj kondukas al konvertiĝo.

4. Sankta Ambrozio diras: “la faroj de la Sinjoro grandas, sed el ĉiuj plej grandas lia Mizerikordo”.

5. Sekva ago de volo manifestita antaŭ la sama eklezia instanco ligita al deklaro de fido nuligos ĉi tiun agon.

La nuna deklaracio ricevita de la Eklezia Kortumo de Funchal estos alkroĉita, post subskribo, al la libro de baptoj kun la jena noto: “La nomito … formale forlasis la Katolikan Eklezion la 19-an tago de aprilo 2024. La koncerna documento troviĝas ĉe la arkivo de la Eklezia Kortumo”. Kopion de ĉi tiu deklaro oni sendos al la deklaranto kaj al lia Bapta Paroĥo: Ponta do Sol. La originalo estis sendita al la Arkivo de la Eklezia Kortumo.

## Ĉu ridi, ĉu plori, ĉu timi?

El tiu ĉi dokumento mi reliefigas kaj prikomentas la jenon:

1. Pozitive:

a) La institucio agnoskas mian rajton apostatiĝi. Jes, ja, la tempoj ŝanĝiĝis!

b) Eĉ pri la enskribota finformulo ĝi sciigas al mi. Do, ĝi faru tion!

2. Negative:

a) "Iam katolika, ĉiam katolika." Ĉu vi ne trouzas vian aŭtoritaton? Surbaze de kio vi arogas al vi tian aŭtoritaton? La kredantoj, ĉu? Certe ne – tia bazo ne permesus al vi ĝeneraligi tiun proklamon ĝuste tiam, kiam unuopa membro (unu el tiuj, kiuj garantius tian aŭtoritaton) disiĝas.

Do, tia aŭtoritato eble venas de ekster la komunumo, ĉu? Certe tion vi pensas, tamen la fonto de tia aŭtoritato ne ekzistas. Atentu: via dio estas konstruo via! Do, via aŭtoritato super iu pereas ĝuste tiam, kiam tiu forflugas el la baza grundo de via institucio.

b) Sed vi daŭrigas kaj fiere anoncas ke tiu, kiu forlasas la Katolikan Eklezion "restas submetita al ĉiuj ekleziaj leĝoj". Ĉu mi timu?

c) Tial vi punas la forlasinton, kiu ricevas kuracan punon, kiun laŭ vi celas redirekti al konvertiĝo. Kiel? Per la kompato de la Sinjoro certe kaj… "la sekvoj menciitaj je k. 1331", pri kiuj vi ĉi-kaze silentas. Ĉu mi timu? Ĉu mi ploru?

Punktoj 2 kaj 3 de la episkopa dokumento ŝvebigas minacojn kiuj rememorigas la Inkvizicion. Ĉu mi timu? Ĉu mi ridu? Fakte, kiam mi unue legis tion, subita ombro mallumigis mian menson kaj surhaŭta tremeto trairis mian korpon. Do, mi timis! Nur post kiam mi revenis al la 21-a jarcento kaj ekkonsciis pri la aroganteco de tiuj, kiuj sin iluzias pri sia daŭra potenco, mi trankviliĝis. Kaj ridis, sed mi konfesas, ke mia rido estis iom "flava" (t.e. ne tro aŭtenta). Institucio, kiu suĉas sian aŭtoritaton el ekstera fonto, kiu prezentas sin kiel mastro, neniam demokratiĝos. Por ili ni ĉiam estos sklavoj!



# ATEO instigis viglajn diskutojn en Afriko kaj en la reto

*Nyegosh Dube (Pollando)*




*Afrika partoprenanto parolas dum la ATEO-kunveno ĉe la UK en Aruŝo, Tanzanio*

"En mia lando ne ekzistas ateistoj," diris al mi kongresano el Kongo DR dum la Movada Foiro en Aruŝo. Li estis unu el du kongaj samideanoj, kiuj venis al la ATEO-tablo kaj komencis diskuton. Almenaŭ dek ĝis dek kvin minutojn mi diskutis kun ili unuope. Tiu unua scivolis interalie kiel eblas, ke la universo povis esti kreita sen Dio. Mi ŝajne ne tre kontentige respondis al li, kaj li foriris sen fariĝi la unua konga ateisto! Mi invitis ambaŭ veni al la ATEO-kunveno la sekvontan tagon, ambaŭ diris ke ili certe venos, sed neniu el ili venis. Estas interese, ke tiu unua havas islaman patron kaj kristanan patrinon kaj ŝanĝis sian religion de la patra al la patrina senprobleme. Nu, klare en granda parto de Afriko, oni estas sufiĉe malrigora pri religio, kaj eĉ ateistoj ne tro ĝenas, kiel oni klarigis en la kunveno.

Ĉirkaŭ 25 personoj partoprenis la ATEO-kunvenon, kiu okazis en la sama ĉambro, kie funkciis la kongresa libroservo (bedaŭrinde nur du-tri horojn tage, sed la libroj estis en la ĉambro dum la kunveno). Ses el la ĉeestantoj estis afrikanoj, ĉiuj el Kongo kaj Tanzanio. Mi petis la afrikanojn paroli pri la situacio de ateistoj en la ĉiutaga vivo en siaj landoj kaj komunumoj. Iom surprize por mi, ili diris, ke ne estas problemo pri persekutado de ateistoj en la ordinara vivo (krom eble iom da socia izoliĝo), kaj ke fakte multaj junuloj estas efektive senreligiaj. En Kenjo, ateistoj agadas por la forigo de la vorto "Dio" en la

nacia himno – Kenjo havas sufiĉe fortan, aktivan ateistan organizaĵon. Do, la bildo de Afriko kiel ege religia kontinento ne estas plene vera. Domaĝe, ke tiu unua kongano el la Movada Foiro ne venis, ĉar kontraŭe al lia aserto, dum la kunveno oni konstatis la ekziston de ateistoj en Kongo DR! Post la UK, ATEO eĉ gajnis du afrikajn membrojn, ambaŭ el Kongo!

La sekretario de ATEO, Anna Lowenstein, provis trovi preleganton inter tanzaniaj neesperantistaj ateistoj, kontaktis du grupojn tiucele, sed neniu respondis. Do, falis al mi la tasko prelegi pri ateismo en Afriko. Jen la ĉefaj punktoj: 1) La plimulto da afrikaj ŝtatoj estas oficiale sekularaj, inkluzive de Tanzanio, la kongreslando; 2) 30 milionoj da subsaharaj afrikanoj konsideras sin senreligiaj, sufiĉe alta nombro; 3) La suda parto de Afriko havas la plej altajn proporciojn de senreligiuloj; 4) Kreskas ateismo en islama Nord-Afriko: en Egiptio troviĝas 3 milionoj da ateistoj. Malgraŭ tiom da ateistoj, estas interese, ke dum la diskuto, unu el la ĉeestantoj diris, ke li renkontis altan nivelon de religieco en Egiptio – ofte la unua demando al li, eŭropano, estis pri lia religio, ne pri lia nacieco.

La diskuto disvastiĝis al aliaj mondpartoj: la malfortiĝanta muro inter religio kaj ŝtato en Usono, kiel montras Luiziano; krucoj en lernejoj en Italio; la nepluekzisto de ŝtata religio en Svedio; kaj religio en lernejoj en Pollando.

En frua novembro ATEO okazigis virtualan asembleon de siaj membroj. Dudek personoj partoprenis, inkluzive de la prezidanto kaj la sekretario de la asocio (Giridhar Rao kaj Anna Lowenstein) kaj mi, la redaktoro de la revuo. Giri bonvenigis la partoprenantojn kaj iom rakontis pri la historio de la asocio. Sekve Anna prezentis membrar-statistikon – inter la 65 membroj, la du plej grandaj grupoj estas francoj (16) kaj usonanoj (6) – kaj anoncis la membriĝon de niaj unuaj membroj el Afriko, du konganoj. Nu jes, ateistoj ekzistas en Kongo! Sekve, mi mallonge parolis pri la revuo, prezentis la temon de la venonta numero (t.e. la nuna, kiun vi legas), kaj bonvenigis John Greenwood el Britio kiel nian novan grafikiston. Li fakte jam enpaĝigis la antaŭan numeron, tiun de majo 2024.

Poste, Anna denove parolis pri la asocio, ĉi-foje pri la financoj. Ŝi montris tabelon de kotizoj pagitaj kaj elspezoj faritaj. La plej granda parto de la elspezoj estas por la revuo (presado kaj ekspedado), aliaj partoj rilatas al salon-mendo dum la UK kaj kotizo al UEA kiel Faka Asocio. La bonhavo de ATEO nun staras je preskaŭ 420 euroj. Tiu kondukis al diskuto pri plialtigo de la kotizoj. Anna proponis altigon de la A-landaj kotizoj al 15/12 eŭroj kaj de la B-landaj al 12/10 eŭroj. Krome, por malpliigi la elspezojn, ŝi sugestis limigon de la revua paĝ-kvanto al 24 kaj ke malpli da ekzempleroj estu presitaj. Sed unu ĉeestanto pensis, ke estus domaĝe fari paĝ-limigon. Alia sugestis meti parton de pli longaj artikoloj sur la ATEO-retejon. Ankaŭ estis demando, ĉu nur la paper-revua kotizo estu plialtigita. Ĝenerale, estis subteno por plialtigo de la kotizoj. Krome estis sugesto, ke oni petu la membrojn fari donacojn. (Post la kunveno John preparis tabelon montrante la financajn postsekvojn de tri diversaj kotiz-strukturoj.)

Sekvis diskuto pri la retejo de la asocio. Anna rimarkigis, ke kvankam Trio zorgas pri la teknika flanko kaj ĉiujare aldonas du numerojn de la revuo, neniu fakte zorgas pri ĝia enhavo. Ŝi demandis, ĉu iu interesiĝas pri tiu tasko. John indikis, ke li estas preta fari tion, aldonante interesajn novaĵojn kaj ligilojn. Trio diris, ke li estas preta starigi forumon en la retejo por diskutoj. La fina punkto rilate al la asocio estis la estraro. Anna opiniis, ke estas tempo por “nova sango”, sed klarigis, ke ne ekzistas formala proceduro por elekti ĝiajn membrojn. Responde al ŝia demando, ĉu iu el la kunvenanoj ŝatus membriĝi en la estraro, Roberto Garcia indikis sian pretecon kvankam la devoj de

estraranoj ne estas tro klaraj – Anna indikis, ke la estraranoj proprainiciate pripensu novajn asociajn agadojn.

Fine, estis diskuto pri la ĉeftemo de la asembleo, nome: "Ĉu okazu instruado pri religioj en la lernejo? Tamen ne instruado de unu religio, sed instruado pri religioj ĝenerale, kaj samtempe pri ateismo/agnostikismo/liberpensado." La plimulto de tiuj, kiuj parolis pri la temo, opiniis ke en iu maniero religio ja estu traktata en lernejoj. Estis diversaj aliroj rilate al tio: lernejoj instruu pri religioj, ĉar ili estas grava parto de la homa kulturo, sed ankaŭ pri ateismo; estas grave instrui la ideojn de la ĉefaj religioj; ili emfazu homajn rajtojn kaj kadre de tio, la rajton al religio kaj ankaŭ la rajton esti senreligia; lernejoj instruu pri religioj kaj senreligieco kadre de lecionoj pri socio kaj civitaneco; ili instruu ne nur pri la ĉefaj religioj, sed ankaŭ pri la kaŭzoj de la ekesto kaj evoluo de religioj.

Giri faris tiurilate prelegeton: laŭ li, lernejoj ne instruu pri religio kiel fonto de vero, sed ili povas uzi religiajn materialojn (ekz. mitojn kaj legendojn), kiel en Barato, kie oni faras tion por propagi la sekularajn valorojn de la konstitucio. Li diris, ke tie ekzistas kontinueco inter komunumo (sufiĉe religia) kaj lernejo. Aliaj tamen preferis eviti aŭ malemfazi religion: religio tute ne estu traktata iel ajn en publikaj lernejoj; lernejoj nepre instruu ateismon (ne nur pri ateismo) kaj pri famaj ateistoj; ili instruu moralon sendepende de religio, kaj ne lasu, ke moralo estu traktata kiel afero de religio; ili instruu pri humanismo. Du ĉeestantoj opiniis, ke estus malfacile instrui pri ateismo en lernejoj. Je la fino de la asembleo, Giri dankis al ĉiuj por “interesa, vigla kaj riĉa babilado”.

## VK-anoj aktive diskutis pri ateismo, religio kaj la medio

En novembra semajnfino dum la ĉi-jara Virtuala Kongreso, ateistaj kaj aliaj interesatoj kunvenis dufoje por dividi siajn opiniojn kaj diskuti pri la aliroj de ateistoj kaj religiuloj al la medio kaj la defio de klimatŝanĝo. Entute 54 homoj partoprenis, el kiuj 12 ĉeestis ambaŭ kunvenojn. Giridhar Rao, la prezidanto de ATEO, prezidis la unuan kunvenon kaj faris enkondukan prelegon. Li notis, ke ĉiuj grandaj religioj havas ion interesan por diri pri la neceso protekti la teron kaj vivantajn estaĵojn. En 2015 la Papo eldonis enciklikon alvokantan la prizorgadon de nia komuna hejmo (la Tero). Laŭ Giri, religianoj kaj ateistoj havas multe da komunaj ideoj kaj povus dialogi kaj kunlabori pri la medio, transirante la limojn de kredsistemoj. Anna Lowenstein, la sekretario de ATEO, kiu mallonge prezentis la asocion en ambaŭ kunvenoj, rakontis pri sia partopreno en manifestacio ekologia, kiu (nesciate de ŝi) estis organizita de anglikanoj.  En la dua kunveno, estis Anna, kiu prezidis kaj faris la enkondukan prelegon. Ŝi emfazis du gravajn diferencojn inter la ateisma aliro al la medio kaj la religia: 1) la bazo de la ateisma mondkoncepto estas scienco, ne senbaza kredo – ateistoj pli atentas avertojn de sciencistoj, dum fundamentismaj kristanoj atendas apokalipson; 2) ateistoj opinias, ke la solvo estas en homaj manoj – ne ekzistas supera instanco, kiu protektos nin kaj ne eblas solvi mediajn problemojn per preĝado. En ambaŭ kunvenoj sekvis interesa, vigla diskuto. Estis klare, ke multaj ĉeestantoj havis opiniojn kaj ĝuis la interŝanĝon de ideoj!

# PRIPENSIGOJ

## Teistnormeca socio mutigas neteistojn

*Bill Maxey (Usono)*

D-ro Kristina M. Lee, docento ĉe la Universitato de Suda Dakoto en Usono, kombinas interesojn pri politika kaj religia retoriko kaj ateismo en esplorprojektoj kaj instruaj prezentaĵoj, en kiuj ŝi eksplikas sian koncepton *teistnormeco*.

Lee difinas teistnormecon jene: "La kompreno pri teismo – la kredo je dio aŭ dioj – kiel superrega kaj natura". Temas do pri baza supozo ke homoj kredas je Dio kaj, almenaŭ publike, pretas akcepti teistajn agnoskojn, ritojn kaj simbolojn. Oni povas esplori la efikojn de tiu supozo sur socion i.a. per studado de lingvaĵo uzata en diversaj sferoj. Paroladoj de gravaj oficialuloj, ekzemple, aŭ debatoj pri komunaj problemoj, malofte enhavas menciojn (aŭ eĉ rekonon) de neteistoj kaj iliaj vidpunktoj.

specifa kulturo ne servas ĉiujn siajn parolantojn egale, ĉar ne ĉiuj parolantoj kontribuas en egala maniero al ĝia formulado". Pli specife, "Lingvo estas ĉefe farita, cirkuligita kaj normigita per la dominantaj grupoj". Ties rakontoj efektive marĝenigas aliajn grupojn kaj ofte enhavas lingvaĵon kiu povas eternigi stereotipojn. La procezo ankaŭ starigas sociajn normojn rilate regulojn de ĝentila diskutado. Tio limigas la esprimivon de marĝenigitaj grupoj, ĉar la disponeblaj lingvaj rimedoj ne tute konvenas al klara komunikado de iliaj ideoj kaj starpunktoj. Marĝenigitoj do devas "traduki" siajn pensojn antaŭ ol ekparoli.

En la kadro de tiu teorio, oni povas konsideri ateistojn anoj de grupo marĝenigita per lingvaĵo muldita kaj disvastigita de (ĉefe) kristanaj kaj islamaj klerikaroj. Siatempe ties rakontoj malprave

> **"Se vi havas la privilegion prezenti senkaŝe vian neteistan identecon, uzu ĝin! Ju pli ni povos normaligi…la mankon de kredo je Dio, des pli facila estos la batalado kontraŭ teistnormeco."**
>
> *Kristina Lee, esploristo pri teistnormeco*

portretis ateistojn negative kaj tiel lanĉis stereotipojn kiuj eĉ jarcentoj poste ankoraŭ efikas forte en la mensoj de teistoj. Pro tio, (almenaŭ) okcidentaj socioj fariĝis kaj restas teistnormecaj, kaj neteistoj trovas sin mutigitaj. En tia medio ateistoj ne povas facile esprimi siajn ideojn kaj devas zorge konsideri kiel envortigi ilin por rezultigi klaran komunikadon.

Laŭ ŝia rezonado, tia medio efektive mutigas la voĉojn de neteistoj kaj do rezultigas specon de diskriminacio. Serĉante la retorikan mekanismon kiu ebligas tion, ŝi turnas sin al la teorio de mutigitaj grupo (angle "Muted Group Theory") de d-ro Cheris Kramarae.

Tiu teorio asertas ke "la lingv(aĵ)o de

Ateistoj do konstante kontraŭbatalas kaj la stereotipojn kiujn eternigis la noca lingvaĵo kaj la marĝenigajn efikojn de la teistnormeca socio mem.

D-ro Lee aparte substrekas tion ke inter la plej gravaj el tiuj efikoj troviĝas teistnormeca leĝfarado, kiun ŝi difinas kiel "oficiala leĝfarado kiu kuraĝigas la publikon vidi sin kiel teistan kolektivon". La tri specoj de leĝoj menciitaj en la usona kristannaciisma Project Blitz provizas nin per ekzemploj.

- Leĝoj kiuj laŭdas la [supozatan] religian karakteron de la lando.
- Leĝoj kiuj atentigas pri [supozataj] kristanaj radikoj de ties socio kaj regsistemo.
- Leĝoj kiuj protektas "religian liberecon" [komprenatan kiel rajto de kristanoj, nome de siaj religiaj kredoj, diskriminacii aliajn homojn, eĉ atencante ties civitanajn rajtojn].

Por kontraŭbatali kaj la lingvajn problemojn kaj la sociajn defiojn, Lee rekomendas kelkajn strategiojn.

Por rezisti mutigadon:

- Eksplicite atentigu kiam ies lingvaĵo emas mutigi homojn.
- Ŝanĝu la lingvaĵon, elpensante pli inkluzivajn vortojn aŭ vortojn, kiuj povas nomi kaj klarigi la spertojn de marĝenigitaj grupoj.

Por rezisti teistnormecon:

- Estu senkaŝa ateisto, se vi povas tion fari sekure. Tiuj kiuj povas sendanĝere anonci sin kiel ateistoj povas agadi, reduktante hontemon kaj batalante kontraŭ teistnormeco, por krei medion kie aliaj povas malkaŝi sin.
- Kondamnu teistnormecajn kutimojn kiam vi rimarkas ilin.
- Kontraŭbatalu teistnormecon en la ĉiutaga vivo kaj kuraĝigu teistajn kaj neteistajn amikojn fari same.
- Subtenu organizaĵojn, kiuj plivalorigas sekurajn lokojn por esprimi neteistajn kredojn kaj kiuj publike kontraŭbatalas teistnormecon.
- Kontraŭstaru teistnormecan leĝfaradon.
- Partoprenu en interreligiaj koalicioj.
- Eduku vin pri la historio de religia libereco.

*Fontoj: Ĉefe du retaj seminarioj, unu por la Humanist Society of Greater Phoenix (Arizono) kaj la alia por la (usona) Secular Student Alliance, ambaŭ en la jaro 2022.*

## Dankon al donacantoj!

La redakcio de Ateismo tutkore dankas la malavarajn membrojn de nia asocio, kiuj lastatempe donacis po 200, 200 kaj 100 eŭrojn por subteni la elspezojn por nia revuo! Kaj ni ankaŭ dankas Trion pro lia financa subteno al nia retejo ateisto.org en kiu troveblas ĉiuj numeroj de la revuo ĝis la pasinta jaro!

# Kritikaj pensoj pri la preĝo "Patro nia"

*Jean-Pierre Cavelan (Francio)*




*"Patro Nia" en Esperanto ĉe la Preĝejo de Patro Nia en Jerusalemo, kie troviĝas tiaj tabuloj en multaj lingvoj*

"Patro nia" estis la unua kompleta teksto aperinta en Esperanto, en la paĝo 19-a de la Unua Libro, de L. L. Zamenhof. Jen ĝi:

> "Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
> sankta estu Via nomo,
> venu reĝeco Via,
> estu volo Via,
> kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.
> Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ
> kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn
> kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj;
> ne konduku nin en tenton,
> sed liberigu nin de la malvera,
> ĉar Via estas la regado,
> la forto kaj la gloro eterne.
> Amen!"

Tiun tekston ripetas ĉiu kristano ekde la infanaĝo. La kredanto ne funkciigu sian kritikan pensadon pri sankta teksto. La kredanto simple obeu kaj ripetu. Li/Ŝi lulas sian menson. Sed kiel sendiulo povas trakti la signifon de la teksto?

> "Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
> sankta estu Via nomo,…"

La preĝo alparolas al imaga persono, ĉar en la ĉielo kaj la universo neniu "Patro" pruvas sian realecon.

> "venu reĝeco Via,
> estu volo Via,
> kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero."

Ĉu tiaj frazoj estas laŭdaj aŭ mallaŭdaj? La kredanto alparolas al la ĉiopovanta kreinto de la universo por esprimi sian deziron kiel eteteta kreitaĵo. Ĉu la simpla malsameco de skalo montras la naivecon de la preĝanto?

> "Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ…"

Neniu Dio donas panon al homo. Oni eĉ povas aserti, ke nenio estas pli artefarita ol la pano. Por akiri panon, oni bezonas cerealojn, kiuj nur de kelkaj jarmiloj estis malsovaĝigitaj de la terkulturistoj. El la grenoj la muelisto akiras farunon. La panfaristo uzas farunon, akvon, salon, giston por knedi kaj kuiri la paston laŭ malsimpla tekniko, kiun la homo sukcesis krei per longega eksperimentado. Kiam oni aĉetas sian panon oni estu pli dankema al ĉiuj laborintaj homoj, kiuj reale laboris por ĝin akiri ol al imaga amiko, kiu lasis niajn praulojn dum centoj da jarmiloj sen koni panon…

> "…kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn
> kiel ni ankaŭ pardonas al niaj ŝuldantoj;"

Tio estas stranga: La kredanto petas al Dio, ke li pardonu ies ŝuldojn, prezentante sin mem kaj aliajn kiel ekzemplojn al Dio. Ĉu ĉioscianta, ĉiopovanta kaj pardonema Dio bezonas ĉi tian peton? Ĉu tia peto ne estas tute simple insulto?

> "…ne konduku nin en tenton,
> sed liberigu nin de la malvera,…"

Nun la preĝanto troigas. Li supozas, ke estas "bona Dio", kiu povus konduki sian kredanton al malbona konduto kaj al malvero… Por nediokredanto jen nova sensencaĵo.

> "…ĉar Via estas la regado, la forto kaj la gloro eterne.
> Amen!"

La fino de la preĝo estas laŭdego same kvazaŭ la preĝanto alparolus al potenca sed ordinara tirano, kiu bezonus flataĵojn.

Konklude:

Ĉu la kreinto de la universo ne povus senti sin insultita per tiaj naivaĵoj? Kaj samtempe ĉi tia preĝo estas forpuŝa por raciemulo.



# Prezidento subtenata de Dio: Usonaj kristan-fervoruloj festas la reelekton de Trump

*Nyegosh Dube (Pollando)*




*Trump kun siaj adorantoj en Alabamo: "Dankon, Sinjoro Jesuo, por Prezidento Trump"*
*(Foto de: Mark Wallheiser / Getty Images)*

Antaŭ ok jaroj, konservativaj kristanoj en Usono demandis sin ĉu Donald Trump, ĵus elektita prezidento, vere estos ilia ĉampiono. Ili estis lacaj kaj koleraj post vagado en la dezerto de la jaroj de Obama, kiam liberalaj valoroj ŝajnis plifortiĝantaj kaj ili sentis sin senpovaj. Trump plenumis iliajn atendojn. La realiĝado de lia promeso al "miaj belaj kristanoj" daŭris eĉ post kiam li forlasis sian postenon, kiam la usona Supera Kortumo nuligis sian decidon en la fama kazo Roe v. Wade (1973), kiu establis la konstitucian rajton al abortigo.

Nun, vidante ke la grandskala reelekta venko de Trump alportas ilin al novaj altoj de potenco, ili kredas, ke lia reveno estas pli ol popol-donita rajtigo: ili kredas, ke ĝi estas dio-donita. Multfoje reprezentinte la elekton por prezidento kiel spiritan kolizion inter bono kaj malbono, gvidaj figuroj en la

movado por refasoni Usonon kiel eksplicite kristanan nacion festis la venkon de Trump kiel plenumon de dia volo. Lance Wallnau, influa televid-evangeliisto, kiu pasigis jardekojn alvokante konservativajn kristanojn ekpreni poziciojn de potenco kaj influo super socio, diris al sekvantoj dum elektonokta ret-elsendo, ke la venko de Trump estis profetita antaŭ jaroj kaj estis ŝlosila paŝo en la plano de Dio enkonduki novan epokon de kristana regado tra la mondo.

Trump ripete invokis dian favoron ekde kiam li postvivis atencon en julio. Kaj kiam li deklaris sian venkon la nokton post la elekto, li faris tion denove: "Multaj homoj diris al mi, ke Dio savis mian vivon pro kialo. Kaj tiu kialo estis savi nian landon kaj restarigi la grandiozecon de Usono". Kvankam usonaj politikistoj ofte invokas Dion aŭ citas la Biblion, la lando eniras novan pejzaĝon, kie Trump estas ne nur la gvidanto de la Respublikana Partio, sed ankaŭ la fakta gvidanto de konservativa usona kristanismo. Dum Trump, edziĝinta trifoje kaj juĝita respondeca pri seksmisuzo, ne ŝajnas taŭga por gvidi religian movadon, Wallnau kaj alia evangeliistoj subtenas lin kiel gvidanton, kiu malgraŭ siaj malperfektaĵoj estis elektita de Dio por savi Usonon de la diabla influo de demokratoj. Tiu kredo akiris novan fervoron post la julia atenco. Laŭ Matthew Taylor de la Instituto por Studoj pri Islamo, Kristanismo kaj Judismo, Trump povus trakti ĝin kiel permesilo por fari ekstremajn agojn.

Subteno por Trump inter evangeliaj blankuloj ne ŝanceliĝis ekde kiam li promesis al ili en 2016, ke se li estus elektita, "vi havos multe da potenco, vi bezonos neniun alian. Vi havos iun, kiu reprezentos vin tre, tre bone. Memoru tion." Trump renovigis tiun promeson en 2024, dirante al kristanoj, ke ili ricevos "potencon je nivelo, kiun vi neniam antaŭe havis" kaj ke la kristanaj gvidantoj, kiuj subtenis lin, havos specialan aliron al la Blanka Domo.

La ideo, ke la usona registaro devus baziĝi sur kristana mondkoncepto, trovis lokon en la unua administracio de Trump, same kiel ĉe la Supera Kortumo, ŝtataj leĝfarejoj kaj lokaj edukaj instancoj. Oni ankoraŭ povas vidi ĝian forton en kaj ekster la registaro, en la falo de Roe, la opozicio al transgenraj rajtoj, la malpermesado de ofendaj libroj, la agado kontraŭ virinaj predikistoj, kaj la iniciato puni virinojn kiuj elektas abortigon. Eĉ kun demokrato en la Blanka Domo, kristana potenco plifirmiĝis en Respublikanaj fortikaĵoj. La ĉefĵuĝisto de la Supera Kortumo de Alabamo invokis Dion en grava verdikto deklarante, ke frostigitaj embrioj havas rajtojn kiel infanoj, kio endanĝerigas envitran fekundigon. La sekretario pri edukado en Oklahomo dekretis ke publikaj lernejoj inkluzivigu la biblion en siajn instruprogramojn. Nova leĝo en Luiziano postulis ke publiklernejaj klasĉambroj ekspoziciu la Dek Ordonojn. La ŝtataj edukinstancoj en Teksaso ĵus aprobis novan “biblio-infuzitan” studplanon por bazlernejoj. Ĉi tiaj aŭdacaj agoj rezultigas eksterordinaran nebuligon de la limoj inter religia instruado kaj laika publika edukado.

Plenkonsciiĝante pri la realeco de lia venko, la sekvantoj de Trump vidas novajn horizontojn. "Ni ĝojas!" diris Jason Rapert, prezidanto de la Nacia Asocio de Kristanaj Leĝfarantoj, kiu ekde 2019 klopodas pliigi kristanan influon en la registaro. Li nomis la venkon de Trump "Ruĝ-Mara momento", aludo al la biblia Libro de Eliro, en kiu Dio mirakle liberigis sian popolon. En la dua administracio de Trump, lia konservativa kristana koalicio havos potencon je la pintoj de ĉiuj tri branĉoj de la registaro. Vicprezidento J. D. Vance (kiu ankaŭ estos prezidanto de la Senato) subtenos viglan specon de katolikismo, kiu antaŭenigas tradiciisman koncepton de familia vivo. Mike Johnson, la prezidanto de la Ĉambro

de Reprezentantoj, kiu asertas ke Usono estis fondita kiel kristana ŝtato, metis evangelian kristanismon en la centron de sia politika kredaro. Kaj la Supera Kortumo, kies nunan konsiston Trump helpis krei, estas preta plifortigi religiajn rajtojn.

Multaj el liaj subtenantoj vidis la batalon por la Blanka Domo kiel sanktan militon, kiun Trump prezentis kiel elekton inter kristanismo kaj ĝiaj malamikoj. La milito komenciĝis per la atako de la 6-a de januaro kontraŭ la Kapitolo, kiam rankoro kaj religia fervoro nutris koleregon kaj malveraĵojn pri la balotrezultoj de 2020. En kampanjaj mitingoj, Trump asertis, ke la administracio de Biden uzis la federacian registaron por celi kristanojn. La programo de la Respublikana Partio promesas krei registaran laborgrupon, kiu batalos kontraŭkristanan diskriminaciadon kaj persekutadon. La kristanaj aliancanoj de Trump ofte komparis Vicprezidenton Kamala Harris, lian konkurintinon, kun la reĝino Izebel, biblia figuro kiu persekutis profetojn. "Kiel kristanoj, ni estas devigataj malhelpi Izebelon ekokupi la tronon," afiŝis Mark Driscoll, influa evangelia pastro el Arizono. Kelkaj pastroj eĉ priskribis ŝin kiel "demona".

Grava parto de la sankta milito estas batalo kontraŭ pluralismaj, feminismaj valoroj kaj la ŝanĝiĝoj en genraj normoj kaj familiaj strukturoj. La mesaĝo de Trump pri vira potenco ĝuste respondis al la kreskanta kolero tiurilate inter multaj konservativaj kristanoj. Tiu kolero akceliĝis post la kresko de la movado MeToo (AnkaŭMi) kaj la pridemandado en Kongreso de Brett Kavanaugh, nomumita de Trump por la Supera Kortumo kaj akuzita de mezlerneja samklasanino pri seks-agreso. Charlie Kirk, fondinto de la grupo Turning Point Action, kiu mobilizis dekstremajn kristanojn dum la elektokampanjo, emfazis la genran dividon. "Viroj devas voĉdoni nun!", li afiŝis en sociaj komunikiloj. Reagoj kontraŭ virina potenco plifortiĝis en konservativaj kristanaj rondoj ekde la unua oficperiodo de Trump.

Kvankam ĉi-kampanje Trump malemfazis abortigon, temo kiu instigis respublikanajn balotantojn dum jardekoj, li intensigis sian opozicion al transgenraj rajtoj. Li promesis kontraŭi la akcepton de transgenruloj en lernejoj kaj en socio. La du temoj mobilizis similan aron da konservativaj kristanaj voĉdonantoj. Kontraŭabortigaj aktivuloj gajnis siajn unuajn gravajn venkojn de la post-Roe-a epoko en Florido, Nebrasko kaj Suda Dakoto, kie balotantoj malakceptis proponojn plivastigi aliron al abortigo. Venkinte en la elekto, konservativaj kristanoj rapide antaŭeniras. Ili faras longperspektivajn planojn forigi la novajn ŝtatnivelajn protektojn por abortig-rajtoj. "Nun komenciĝas la laboro malmunti la por-abortigajn politikojn de la administracio de Biden-Harris," diris Marjorie Dannenfelser, prezidanto de la kontraŭabortiga grupo Susan B. Anthony Pro-Life America.

Antaŭ la elekto, Rob McCoy, pastro de Godspeak Calvary Chapel en Suda Kalifornio, priskribis la kontraŭulojn de Trump kiel la "malamikon", kiu "provis fari tiom da socie malunuigaj kaj malbonaj agoj". "Sinjoro, bonvolu fari ion grandiozan kaj potencan," li preĝis. Kaj kiam la rezultoj venis, la sekvantoj de Trump kredis, ke Dio faris ĝuste tion.

*Artikolo preparita surbaze de du artikoloj el la New York Times (aŭtoroj: Elizabeth Dias & Ruth Graham, kaj Elizabeth Dias), kaj unu el NBCNews.com (aŭtoro: Mike Hixenbaugh).*

## Usona juĝisto haltigas luizianan leĝon pri la Dek Ordonoj, sed…

En novembro venis bona novaĵo por tiuj en Usono, kiuj batalas por sekulara socio kun la apartigo de ŝtato kaj religio postulata en la usona konstitucio. Federacia juĝisto de usona distrikta kortumo en Luiziano deklaris, ke leĝo aprobita de ŝtata leĝfarejo kaj subskribita de la guberniestro en junio 2024, estas kontraŭkonstitucia kaj ordonis haltigon de ĝia efektivigo. La juĝisto John deGravelles priskribis la leĝon kiel "diskriminacian kaj trudan". La plejmulto da luizianaj leĝfarantoj, kune kun la guberniestro, deziris trudi religian fundamentismon al lernantoj en publikaj lernejoj en sia ŝtato. Aperis artikolo pri la nova leĝo en la lasta numero de nia revuo (Majo 2024). Tamen bedaŭrinde, kelkajn tagojn post la decido de la juĝisto deGravelles, okazis stranga kontraŭago fare de juĝisto de usona apelacia kortumo: li blokis tiun parton de la decido, kiu postulas ke oficialuloj de la ŝtata eduksistemo informu lernejojn pri la decido. Oni povas supozi, ke ĉiuj lernejaj instancoj en Luiziano aŭdis pri la decido, sed nun ili povas ŝajnigi, ke ili ne scias pri ĝi! La ĝenerala prokuratoro de Luiziano intencas efektivigi la leĝon, kaj praktike ignori la decidon bloki ĝin. Nekredebla afero!

*Fontoj: Reuters kaj The Guardian*

# Blasfemo-leĝoj kaj persekutado de kristanoj en Pakistano

*Noto de la redakcio: De tempo al tempo, ni aperigas artikolon pri persekutado kontraŭ anoj de specifa religio. Libereco de kredo devus gravi por ateistoj, eĉ kiam temas pri religianoj. En Usono fundamentismaj kristanoj celas teokratian ŝtaton, sed en Pakistano, kristanoj estas viktimoj de teokratio, kune kun hinduoj, ateistoj kaj foje islamanoj mem.*

Amasperforto kaj linĉado pro akuzoj pri blasfemado; kontraŭvola geedzigo kaj konvertado; ekonomia subigado kaj ŝuldsklaveco: Pakistano nun estas konsiderata la sepa plej danĝera loko por kristanoj, laŭ Open Doors, internacia organizaĵo, kiu subtenas persekutatajn kristanojn.

En majo de ĉi tiu jaro, maljuna kristana viro nomita Nazir Masih estis batita ĝismorte de kolera homamaso en Panĝabo, Pakistano. La okazaĵo erupciis pro falsaj akuzoj ke li insultis la Koranon. La atakantoj prirabis ŝu-butikon posedatan de lia filo kaj forbruligis lian hejmon, kie dek du familianoj vivis. Kiel kaptite en video, dum la tumulto oni kriis sloganojn de islamisma partio konata pro atakoj kontraŭ kristanoj kaj hinduoj. Ĉi tiu lasta okazaĵo estas parto de pli granda kampanjo de subpremado, kiun alfrontas la kristana minoritato de Pakistano, kiu konsistigas nur 1,37% de la loĝantaro, proksimume 3,3 milionojn da homoj.

Blasfemo-leĝoj en Pakistano estas striktaj, kaj tiuj juĝitaj kulpaj povas esti kondamnitaj al morto. En marto, tribunalo en Gujranwala, Panĝabo, kondamnis 22- kaj 17-jaraĝajn islamanojn al mortpuno kaj dumviva enkarcerigo respektive en du apartaj kazoj pro insultado al la profeto Mohamedo. La arestoj kaj kulpaj juĝoj sekvis akuzojn, ke la du dividis blasfeman enhavon per WhatsApp.

Kvankam Pakistano neniam efektive plenumis mortkondamnon pro blasfemo, laŭ Human Rights Watch pluraj homoj



*Junaj pakistanaj kristanoj protestas pro atakoj kontraŭ kristanaj preĝejoj (Foto de: AFP)*

nuntempe atendas plenumon de mortkondamno, post ĝis dekjara malliberigo pro blasfem-akuzoj. Krome, multaj akuzitoj estas terure batitaj aŭ eĉ linĉitaj antaŭ ol atingi malliberejon. Ekde 1990, 65 blasfem-akuzitoj estis mortigitaj eksterleĝe.

Dum blasfemo-leĝoj tuŝas la tutan loĝantaron, ili estas precipe uzataj por celi kristanojn. Akuzoj pri blasfemado povas inciti amasperforton kontraŭ la akuzitoj kaj iliaj komunumoj. En aŭgusto 2023, post kiam grupo de religiemaj ekstremistoj akuzis du kristanojn pri insultado de la Korano, centoj da islamaj viroj atakis kristanan setlejon Jaranwala en la Faisalabad-distrikto de la provinco Panĝabo. La homamaso, armita per ŝtonoj, bastonoj kaj fajro, detruis kristanajn preĝejojn, hejmojn kaj tombejojn. Entute, proksimume 1000 kristanaj familioj estis trafitaj.

Lastatempe, persekutado de kristanoj en Pakistano pliiĝas. Kristanoj ofte estas marĝenigitaj kaj alfrontas diskriminacion en laboro, edukado kaj sociaj servoj, kaj ankaŭ ŝuldsklaviĝon, kiu tenadas multajn kristanajn familiojn en stato de konstanta servuteco. Familioj ofte pretas pagi ion ajn aŭ cedi ajnan proprieton por eviti areston pro blasfemo. Ekzistas multaj raportoj de kristanaj virinoj, kiuj estas submetitaj al forkapto kaj al kontraŭvolaj konvertoj kaj geedzigoj. Krom marĝenigo kaj amasperforto, celataj mortigoj foje trafas kristanojn. Pasintjare, en du apartaj okazaĵoj, pafantoj mortigis katolikajn laikon kaj pastron.

Por tiuj akuzitaj pri blasfemado, trovi juran reprezentadon estas komplika ĉar advokatoj, kiuj elektas defendi ilin, alfrontas seriozajn riskojn, inkluzive de mortminacoj. Okazis, ke advokatoj, juĝistoj kaj aliaj aktivaj en kazoj pri blasfemado estis atakitaj, foje mortigitaj, fare de ekstremistoj. Tio kreas klimaton de timo, kiu malinstigas multajn jurajn profesiulojn alpreni tiajn kazojn.

La pakistana registaro estas kritikata de diversaj organizaĵoj kaj registaroj pro sia nesufiĉa protektado de kristanoj kaj aliaj religiaj malplimultoj. En sia Jarraporto de 2024, la Usona Komisiono pri Internacia Religia Libereco, oficiala organo, rekomendis ke la Departemento de Ŝtato denove nomu Pakistanon "Lando de Aparta Zorgigo" pro ĝiaj sistemaj kaj daŭraj malobservoj de religia libereco.

*Artikolo (verkita de Antonio Graceffo) aperinta en la retejo providencemag.com de la Instituto pri Religio kaj Demokratio, ekumena kristana “pensfabriko” – mallongigita, tradukita kaj iom modifita de la redakcio de Ateismo.*

# Israelo kaj Palestino nun troviĝas en religia milito

Io stranga okazas kun Israelo, skribas Elie Barnavi, iama israela ambasadoro al Francio kaj elstara historiisto kaj verkisto, en sia aŭtobiografio *Confessions d'un bon à rien* ("Konfesoj de sentaŭgulo"), eldonita antaŭ la nuna Gaza-milito, sed kies analizo plene aplikeblas al tiu situacio. En malpli ol jarcento lia lando "trairis la tutan sinsekvon de eŭropaj militoj, sed en inversa ordo".

En Eŭropo, religiaj militoj furiozis dum granda parto de la 16-a kaj 17-a jarcentoj, en kiuj batalis inter si katolikoj kaj protestantoj. La situacio ŝanĝiĝis nur post la Paco de Vestfalio en 1648. Ekde tiam ŝtatoj iĝis la ĉefaj agantoj en internacia politiko. Israelo, Barnavi argumentas, sekvis la kontraŭan trajektorion. La militoj de Israelo komenciĝis kiel bataloj inter ŝtatoj, sed tiu ĉi interŝtata militado finiĝis kun la Jomkipura milito en 1973. Post tio, Israelo ne plu batalis en grandskalaj militoj kontraŭ aliaj ŝtatoj kaj anstataŭe ĉefe batalis kontraŭ palestinaj gerilanoj. Tamen eĉ en tiu nova fazo, la israela-palestina konflikto restis konflikto inter du nacioj, du naciaj movadoj, pri la sama terpeco.

La israela-araba konflikto poste ŝanĝis sian karakteron. Ambaŭflanke, politiko kaj socio nun estas profunde dividitaj. Kaj en Israelo kaj en Palestino, la ĉefa interna divido estas inter tiuj kiuj estas laikaj kaj tiuj kiuj estas religie motivitaj. Ambaŭflanke, la religia tendaro ŝajnas esti gajnanta superecon. En Israelo la religiaj koaliciaj partneroj de Netanjahu estas senkompromisaj kaj li ne povas kontraŭstari ilin ĉar alie lia registaro falos kaj li perdos leĝan imunecon kontraŭ diversaj akuzoj. Je la palestina flanko, la registaro de Mahmoud Abbas grandskale perdis subtenon kaj la populareco de Hamas multe kreskis post la masakroj de oktobro 2023.

Kio antaŭe estis nacia konflikto ĉiam pli fariĝas religia konflikto. Barnavi, kiu amplekse studis la religiajn militojn de Eŭropo, skribas: "La kreskanta potenco de fundamentistoj ambaŭflanke trenas nin reen al la antaŭmoderna, antaŭ-Vestfalia epoko — al la religiaj militoj en Eŭropo de la dua duono de la 16-a jarcento kaj la unua duono de la 17-a jarcento." Tio estas malbona novaĵo. La religiaj militoj en Eŭropo estis teruraj. Ĉiuj batalis kontraŭ ĉiuj, kaj ne estis modereco en militado. La franca 16a-jarcenta filozofo Michel de Montaigne travivis ilin kaj skribis pri ili en siaj *Eseoj*. Se religiaj fanatikuloj povas fari kion ajn ili volas, li rimarkis, kompromisoj ne plu eblas.

Sen mencii Montaigne, Barnavi ŝajnas alveni al la sama konkludo. Du landoj povas intertrakti konsenton en situacio kie ambaŭ kontentiĝas je malpli ol ili komence postulis. Sed du tendaroj, kiuj profunde kredas, ke Dio donis al ili la teron, ne kapablas fari tion, ĉar ĝi postulas, ke ili rezignu pri la fundamento, sur kiu baziĝas iliaj kredoj kaj identecoj. La demando, ĉu Israelo kaj la palestinanoj povas restartigi sian haltintan pacprocezon, dependas ĉiam malpli de intertraktadoj inter la du flankoj — kiel estis la kazo antaŭ 30 jaroj, kiam la rezulto estis la Oslo-pacinterkonsentoj — kaj ĉiam pli de la lukto ene de la du tendaroj inter la laikaj kaj religiaj flankoj.

Eŭropaj religiaj militoj fine ĉesis pro la apero de la moderna, relative laika ŝtato kapabla je kompromiso; ĝiaj pretendoj pri *raison d'état* fine venkis. Male, la religia milito en la Mezoriento nuntempe plifortiĝas ĉar la ŝtato (aŭ la nacia movado, ĉe la palestina flanko, kiu antaŭe havis laikan karakteron) malfortiĝas. Kompromiso tie estas nun pli malfacila ol iam ajn. Oni povas nur esperi, ke intensaj diplomatiaj klopodoj de eksteraj fortoj, ĉefe de Usono kaj kelkaj Golfaj ŝtatoj, fine donos fruktojn.

*Artikolo aperinta en la retejo de la usona revuo Foreign Policy (verkita de Caroline de Gruyter), mallongigita kaj tradukita de la redakcio de Ateismo.*

# ATEISMO

## ENHAVO


**VORTO DE LA REDAKTORO** 2

**ATEISMA VIVO**

La morala ĝangalo kaj la malfido kontraŭ ateistoj 3

Kiel malfidigaj stereotipoj pri ateistoj efikas sur la usonan socion 6

Malfido kaj malestimo al ateistoj kaj alireligiuloj: kiam emocio pli fortas ol racio 8

La vojo al apostatiĝo: la Katolika Eklezio nek demokratas nek demokratiĝos 9

ATEO instigis viglajn diskutojn en Afriko kaj en la reto 11

**PRIPENSIGOJ**

Teistnormeca socio mutigas neteistojn 14

Kritikaj pensoj pri la preĝo "Patro nia" 16

**ĈIRKAŬ LA MONDO**

Prezidento subtenata de Dio: Usonaj kristan-fervoruloj festas la reelekton de Trump 18

Blasfemo-leĝoj kaj persekutado de kristanoj en Pakistano 21

Israelo kaj Palestino nun troviĝas en religia milito 23



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao (Barato)
Sekretario: Anna Lowenstein (Britio)
Redaktoro: Nyegosh Dube (Pollando)
Lingva kontrolo: Bill Maxey (Usono); Anna Lowenstein (Britio)
Grafikisto: John Greenwood (Britio)
Kasisto: Dieter Rooke (Svislando)
La Estraro de ATEO ampleksas ĉiujn listigitajn ĉi-supre
kune kun Roberto Garcia (Britio)

Jarkotizo (kun reta revuo): €13 (A-landoj) / €10 (B-landoj) / €6 (Afriko)
Jarkotizo (kun papera revuo): €16 (A-landoj) / €13 (B-landoj kaj Afriko)
Konto: **ateo-y** ĉe UEA